Senior High School, *Rockville Centre, N. Y.*, has a group of 15 young people studying under a most able teacher, *Mr. O. W. Allen*. Senior H. S., *Rochester, Minnesota*, *Bruno Beckman*, reports an enthusiastic class of 40 students studying Esperanto with him. *Principal John M. Brewer*, of Crab Orchard Community H. S., *Marion, Ill.*, has two High School Esperanto Clubs with regular sessions. In *Hillsboro, Oregon*, *Warren Ewing* has an Esperanto class in the High School for the second year. At *Fresno H. S., Fresno, Calif.*, *David Metzler* is busy teaching a group of young people. *Charles Simon* is teaching a club of 30 students in the *Roxboro Jr. H. S., Cleveland Heights, Ohio*.

In *New York City*, the "Youthbuilders", an interracial, intercultural group-activity of youth in the Junior and Senior High Schools, sponsored by the Board of Education, has established an

Esperanto class for representatives of many schools in the City. About 35 young people are studying under the instruction of *Doris Tappan Connor*.

Prof. E. A. Rogers, President of the Montezuma Mountain School for Boys, *Los Gatos, Calif.*, writes: "We have taught Esperanto in the 8th Grade (required subject) since the school was founded in 1911." *Robert Alberg*, of *Lynn, Mass.*, is again teaching Esperanto two times a week in Eastern Junior High School. In the sixth grade of the *Las Cruces, New Mexico*, elementary school, *Marguerite Samaniego* is teaching Esperanto to 25 children.

In Oregon, official classes have been organized under the auspices of the State System of Higher Education, Extension Division. *Prof. J. M. Clifford*, a long time Esperantist, teaches the group of 28 paid registrants in *Portland*, and another class of 19 in *Corvallis*. A third class in *Eugene*, is scheduled to get under way soon. At *Converse College, Spartanburg, S. C.*, *Weldon T. Myers*, is teaching Esperanto to 40 students. *Charles E. Briggs*, *Long Beach, Calif.*, teaches a beginner's group organized under the auspices of the Long Beach City College. The Provincial Institute of Technology, *Calgary, Alberta, Canada*, has an Esperanto Club of 14 members under the guidance of *G. Ewart Brown* of the Institute Staff. *Rollins College, Winter Park, Florida*, gives official credit for Esperanto courses under *Prof. Edwin L. Clarke*.

This is, of course, an incomplete report, and we ask teachers to send information on other classes and activities in schools. Also, please send reports on Esperanto classes other than those in schools. These will be printed in an early issue of *A.E.*

Library and gift subscriptions are due. \$10 for ten subs, \$1.50 for single sub.

TRA LA LINGVA KONFUZO

DE LA UNUIGITAJ NACIOJ

D-RO W. SOLZBACHER

Antaŭ nelonge mi pasigis interesan tagon en la "provizora ĉefurbo de la mondo", en Lake Success, proksime al la urbo New York, kiel gasto de la Informa Sekcio de la Unuigitaj Nacioj, kune kun aliaj prelegistoj pri internaciaj aferoj. Estis jam malfrue en la posttagmezo, kiam mi foriris el la granda salono de la Sociala kaj Ekonomia Konsilantaro, kie okazis diskuto pri la hispana problemo, kaj serĉis Komitatan Cambron 4, kie la "samtempa" traduksistemo estas uzata. Trovinte la enirejon, mi diskrete engliĝis. Iu delegito estis faranta ruslingvan paroladon pri la problemo de la rifuĝintoj. Proksime al la pordo la seĝoj ŝajnis esti sufiĉe mallargaj kaj malmolaj, sed iomete antaŭe mi rimarkis neokupitan belan brakseĝon, kiu aspektis tre komforta. Rapide kaj silente, por ne ĝeni la aliajn, mi antaŭeniris kaj eksidis en la brakseĝo. Mi tuj prenis la kapaŭskultilojn, metis ilin sur mian kapon, kvazaŭ ili estus kasko, kaj alĝustigis ilin sur miaj oreloj. La parolado, kiun mi antaŭe aŭdis ruse, tuj fariĝis hispanlingva . . . Mi ĉirkaŭrigardis en la salono kaj iom konsterniĝis, kiam mi vidis, ke mi sidas ĉe tablo, kiu havas formon de hufferaĵo, kaj ke antaŭ mi troviĝas ŝildo kun surskribo "Paraguay". Mi do kontraŭvole sidis ĉe la tablo de la delegitoj kaj "reprezentis" la malproksiman respublikon Paragvajo. Mi rimarkis, ke mia maldekstra najbaro estas la delegito de Norvegujo, mia dekstra la delegito de Panamo.

Neniu ŝajnis atenti min, kaj mi pensis, ke, se mi tuj forirus, tio povus esti pli granda skandalo, ol se mi restus. La kunveno ne plu povos daŭri multe da tempo, kaj do la vera delegito de Paragvajo preskaŭ certe ne revenos. Mi do restos en mia komforta delegita

seĝo. Kiam la voĉdonado venis, mi kompreneble neniam levis mian manon. Sed ĉiam estis sufiĉe granda nombro da sindetenoj. Ĉu en tiu posttagmezo oni enkalkulis la voĉon de Paragvajo inter ili, mi ne scias.

Mia ĉefa intereso en tiu kunsido, en kiu mi okupis la seĝon de Paragvajo, estis la lingvaj aranĝoj. Dekstre sur mia seĝo mi trovis la aparaton kun la butono, kies ses pozicioj ebligas elekton inter 5—kaj teorie eĉ 6—lingvoj, en kiuj oni povas sekvi la paroladojn kaj diskutadon. La unua pozicio donas la paroladon en la lingvo de la parolanto, kiu ajn ĝi estu. La aliaj kvin pozicioj alportas al la aŭskultanto la paroladon aŭ ĝian tradukon en angla, franca, rusa, hispana kaj ĉina lingvoj. Fakte do la unua kaj dua butono donas la originalan paroladon, kiam ĝi estas anglalingva, la unua kaj tria, kiam ĝi estas franca, la unua kaj kvara, kiam ĝi estas rusa, ktp. Speciala butono ebligas pli aŭ malpli laŭtan aŭskultadon.

En unu flanko de la salono mi vidis ses "vitrokaĝojn". En unu troviĝas la inĝenieroj, kiuj kontrolas kaj reguligas la tutan komplikitan aparaton de mikrofonoj, telefonoj kaj elektraj ŝnuroj, la signalojn al la parolanto, kiuj signifas "Haltu" aŭ "Parolu pli malrapide", ktp. La aliaj kaĝoj enhavas grupojn da interpretistoj, ĝenerale tri aŭ kvar por ĉiu lingvo. En la ĉina kago ekzemple unu persono tradukas en la ĉinan lingvon el la angla, alia el la franca, alia el la hispana, alia el la rusa lingvo. Kompreneble kelkaj tradukistoj povas traduki el pli ol unu lingvo; tial kelkaj kaĝoj enhavas nur tri personojn. La interpretisto, kiu troviĝas malantaŭ vitro sufiĉe dika por ne tralasi sonon, aŭskultas la parolanton tra telefono — aŭ tenas en la

mano lian manuskripton, se la parolado estas antaŭe preparita; li parolas en mikrofonon, kiu estas ligita per telefonŝnuroj al ĉiuj seĝoj de la delegitoj, konsilantoj kaj vizitantoj.

La sistemo ne plu estas nova. Ĝi estis proponata unue en la jaro 1925 de Edward A. Filene el Boston, Usono, kaj la teknikajn detalojn ellaboris Prof. Gordon Finlay el Anglujo en 1926, kiam oni uzis ĝin eksperimente en la Internacia Labor-Konferenco en Geneve. Sur pli granda skalo la Internacia Labor-Oficejo uzis ĝin post 1929. Oni nomis la sistemon Filene-Finlay-Parolad - Tradukilo (Filene - Finlay Speech Translator). Ĝin uzis poste la Konferenco pri Malarmado, la Belga Parlamento kaj diversaj internaciaj kongresoj. En plibonigita formo ĝi estas uzita en la granda proceso kontraŭ la militkrimuloj en Nurnberg. La Unuigitaj Nacioj unue ne uzis ĝin, sed poste decidis enkonduki ĝin sur eksperimenta bazo en unu Komitata Ĉambro depost Oktobro 1946.

Observante la sistemon en praktika uzo, mi rapide konstatis, ke la ĵurnaloj estis pravaj dirante, ke la malfacilaĵoj ne plu estas teknikaj, sed nur personaj. La sono en la kapaŝkultiloj estis klara kaj agrabla, la pezo de la "kasko" ne plu estis tro granda (kiel ĝi estis antaŭe), la manipulado de la aparato estis facila. Se oni havus perfektajn parolantojn kaj perfektajn interpretistojn, ĉio estus bona.

Bedaŭrinde perfektaj "samtempaj" tradukoj ne ekzistas kaj eble neniam ekzistos. La avantaĝoj de la sistemo estas pagataj per gravaj malavantaĝoj, kies plej danĝera estas la manko de klareco kaj korekteco. Eĉ la plej bona interpretisto ne povas eviti tion.

Se ĉiuj paroladoj estus majstroverkoj de logiko kaj klareco, la afero estus multe pli simpla. Bedaŭrinde multaj personoj, eĉ eminentuloj, parolas konfuze, kaj la aŭskultanto bezonas kelkajn minutojn por eltrovi, kion la parolanto

volas diri. Se tio estas vera por personoj parolantaj en sia propra lingvo, la danĝero estas multe pli granda, se norvego parolas angle, polo ruse aŭ egipto france. Oni ne forgesu, ke la "samtempa" traduksistemo ne permesas al ĉiuj paroli en sia propra lingvo, sed nur elekti inter kvin "oficialaj" lingvoj. Se kelkaj partoj de parolado estas konfuzaj kaj la traduko estas farata je la fino, la interpretisto havas tempon por kapti la esencan ideon kaj konsideri ĝin en la traduko. La "samtempa" tradukisto ne povas fari tion, ĉar li devas traduki frazon post frazo, ofte vorton post vorto. Kelkfoje li trovas, ke la esenca ideo estas tute malsama de tio, kion li une komprenis aŭ divenis. Tiam li devas korekti antaŭajn tradukojn, aŭ li komencas balbuti aŭ diri sensencaĵojn. Mi observis tion en Lake Success. Unu franca interpretisto daŭre korektis siajn antaŭajn frazojn. Hispana tradukistino, kies belan kaj melodian voĉon mi admiris, kelkfoje diris ion tute alian ol la parolanto. La rusa interpretisto kelkfoje sonis furioze, kiam la parolanto estis trankvila; kaj melankolia, kiam la parolanto estis pasia. La plej mirigan impreson mi ramen ricevis de la ĉinaj tradukoj. Mi ne komprenis ilin, sed nur kaptis de tempo al tempo iun "fu", "dzui" aŭ "ĉi". Sed estis evidente, ke la ĉinaj getradukistoj eltrovis propran sistemon de radikala plilongigo. Por 20 anglaj aŭ rusaj vortoj ili tradukis nur tri aŭ kvar ĉinajn vortojn, kvazaŭ en stenografia lingvaĵo. Estas vere, ke, se ili tradukus ĉion, ili fariĝus multe pli lacaj ol iliaj kolegoj. La anglaj kaj rusaj interpretistoj almenaŭ povas ripozi, kiam longaj paroladoj estas farataj en angla aŭ rusa lingvo kaj la delegitoj samlingvaj povas aŭskulti la originalan paroladon. Sed neniu en UNO ŝajnas fari oficialajn paroladojn en ĉina lingvo, eĉ ne la ĉinaj delegitoj. La ĉarma fraŭlino kaj ŝiaj viraj kolegoj en la ĉina "kaĝo"

do neniam havas paŭzon kaj devas traduki eĉ la vortojn de la ĉina delegito el la angla en la ĉinan lingvon.

Unu el la ĉefaj interpretistoj de UNO en la "alia" traduka fakotitis al mi, ke ĝenerale la Sekretariejo nun pli facile trovas interpretistojn por la "samtempa" sistemo ol por la "post-paroladaj" tradukoj. La kaŭzo estas, ke la "samtempaj" tradukistoj ne bezonas havi tiel bonan memorpovon kiel iliaj kolegoj, por kiuj "fotografita mensuro" estas esenca kvalito. Ŝajnas, ke la plimulto de la spertuloj konsentas, ke la kvalito de la "samtempaj tradukoj" ĝenerale estas malpli bona ol tiu de tradukoj laŭ la tradicia metodo.

Tiun alian metodon mi observis samtage en la Komitato diskutanta Hispanujon. La tradukoj estis treege temporabaj. Ekzemple, kiam la bjelorusa delegito parolis 23 minutojn en la rusa lingvo, la angla traduko bezonis 18 minutojn, la franca traduko 19 minutojn. Alivorte: tuta horo estis perdita por parolado, kiu enhavis nur malmulte da konkretaj faktoj aŭ proponoj, sed multe da elokventaj oratorajoj. Delegito de sudamerika lando klopodis fari impresan paroladon kun energiaj frazoj, multaj gestoj kaj pugnobatoj sur la tablon. Mi estas certa, ke la parolado estus tre konvinka, se li farus ĝin en sia propra sonora idiomo. Bedaŭrinde li insistis paroli en la angla lingvo, kiun li scipovas flue, sed ne tute korekte kaj ne kun la nuancoj necesaj por tia prezentado. Kelkfoje do lia oratorado sonis ekzakte kiel la karikaturoj imitoj, kiujn prezentas usonaj radio-programoj, kaj kiuj ĉiam amuzas la aŭskultantojn. Delegito de skandinava lando klopodis enmeti ŝercojn kaj vortludojn en sian anglalingvan paroladon. Fari tion en fremda lingvo estas bedaŭrinde tre malfacile. Estis preskaŭ dolorige vidi, kiel la aŭskultantoj ridis, kiam la parolanto volis diri ion seriozan, kaj restis seriozaj, kiam li intencis fari ŝercon . . .

La interpretistoj en la kunveno estis bonaj, sed eraroj estis neeviteblaj. Kelkfoje oni lasis tiujn erarojn "pasi" senproteste, sed en aliaj kazoj la parolintoj ekstaris por korekti la tradukon ĝentile aŭ kolere.

Kiam longa parolado anglalingva finiĝis kaj la franclingva traduko komenciĝis, oni povis vidi amasan elmigradon el la salono. Inter tiuj delegitoj, kiuj restis, estis multaj, kiuj tuj eliris el siaj poŝoj ĵurnalojn, librojn aŭ privatajn korespondaĵojn. Ili sendube konsideris la tradukon kiel paŭzon en la kunveno. Kiam la sekvanta anglalingva parolado komenciĝis, la foririntoj revenis unu post la alia, sed ne ĉiuj ĝustatempe. Do la efektiva tempoperdo estis ankoraŭ pli granda ol la daŭro de la traduko.

La aŭskultantoj ankaŭ ofte foriris, kiam traduko aŭ parolado neanglalingva komenciĝis. Nur dum la longa parolado de la bjelorusa delegito preskaŭ ĉiuj restis en la salono, aŭskultante, sed ne komprenante. Fine venis unu formulo, kiun anglalingvano, kiu ne lernis la rusan lingvon, povas kompreni: "likvidacia Frankiskovo faŝisma" ("La likvido de la Franko-faŝismo"). La plimulto de la aŭskultantoj laŭte aplaudis. Rimarkinte, ke tiuj vortoj estis la solaj, kiujn la aŭskultantaro komprenis, la bjelorusa delegito ripetis ilin ĉiam denove, havigante al si multe da aplaŭdo — kaj perdigante al la komitato multe da tempo.

Kiel multaj el la aliaj vizitantoj al la kunvenoj de la Unuigitaj Nacioj, mi venis al la konkludo, ke la lingvaj baroj en la laboro de la organizo estas tiel grava malhelpo al ĝia sukceso, ke nek la "ordinara" nek la "samtempa" traduksistemo povas esti kontentiga solvo. UNO bezonas efikan, simplan kaj klaran *Interlingvon* por siaj kunvenoj kaj laboroj. Estos necese pruvi al ĝi konvinke, ke Esperanto estas la definitiva respondo al la demando.

THE ESPERANTO STUDENT

Here are some expressions which you should learn well, for your visit to an Esperanto home. Don't think this is an imaginary episode, because someday you may visit this very same "familio". They live in California, and their names are "Chomette"! Note especially the use of the *-n* ending to express direction towards: Ni iru en la ĝardenon. Metu vian mantelon sur la benkon.

La Vizito

Bonan tagon, sinjorino! Ĉu S-ro Chomette estas hejme? Mi estas S-ro Girard, Esperantisto de Kanado.

Mi ĝojas renkonti vin sinjoro. Envenu, mi petas. S-ro Chomette iris antaŭnelonge al la butikoj, sed li revenos baldaŭ. Ĉu vi deziras atendi?

Jes, dankon. Ĉu vi estas S-ino Chomette?

Jes, mi estas. Bonvolu meti vian mantelon sur la benkon. Sidiĝu, mi petas.

Mi dankas. Vi bele parolas Esperante, sinjorino.

Ho, jes, . . . en ĉi tiu domo estas necese. La tuta familio parolas Esperante.

Ĉu vi havas infanojn?

Jes, du filinojn. Dianto havas dek kvar jarojn, kaj Lilio havas dek-du.

Kie ili estas? Mi ŝatus renkonti ilin.

Ho, ili ludas en la ĝardeno, mi supozas. Jen . . . venu . . . ni iru en la ĝardenon.

Kiel bela estas via ĝardeno! Tre ĉarma!

(*Vokas*) Dianto! Lilio! Kie vi estas? . . . Nu, ŝajne ili estas for . . . Sed, jen venas alia Esperantisto!

Kie? Mi petas! Mi vidas nur etan hundon.

Rigardu! Estas nia Esperantista hundo, "Amiko"! . . . Venu al ni, Amiko! Ankaŭ li komprenas Esperanton!

(*Ridas*) Kiel do? Vi vere estas rimarkinda Esperantista familio. Mi gratulas vin!

The Visit

Good day, madam! Is Mr. Chomette home? I am Mr. Girard, an Esperantist from Canada.

I am pleased to meet you, sir. Come in, please. Mr. Chomette went to the store not long ago, but he will be back soon. Do you wish to wait?

Yes, thank you. Are you Mrs. Chomette?

Yes, I am. Please put your coat on the bench. Sit down, please.

Thank you. You speak Esperanto beautifully, madam.

Oh, yes, . . . in this house it is necessary. The whole family speaks Esperanto.

Do you have any children?

Yes, two daughters. Dianto is fourteen years old, and Lilio is twelve.

Where are they? I would like to meet them.

Oh, they are playing in the garden I suppose. Well now . . . come . . . let us go into the garden.

How lovely your garden is! Very charming!

(*Calls*) Dianto! Lilio! Where are you? . . . It looks like they are away . . . But here comes another Esperantist!

Where? Please! I see only a little dog.

Look! It is our Esperantist dog, "Amiko"! . . . Come to us, Amiko! He also understands Esperanto!

(*Laughs*) So? You are truly a remarkable Esperantist family. I congratulate you!

LITERATURA MONDO, denove estas eldonita en Budapeŝto. Tiuj kiuj deziras ricevi la gazeton, sendu \$2.50 al A.E. por tutjara abono. Petu senpagan prospekton.

ESPERANTO-KRONIKO

Famaj kaj konataj psikiatroj, D-ro A. A. Brill kaj Majoro H. L. Gordon, estas ankaŭ Esperantistoj. D-ro Brill estas nomita en freŝdata eldono de *Life*, "la dekano de Freud-psikoanalizo en Usono". Li persone konis D-ron Zamenhof. D-ro Gordon estas klerulo pri hebreaĵoj. Li deĵoras nuntempe kiel psikiatro en veterana mal-sanulejo. Li skribis: "Mi estas Esperantisto depost 1910. Dum multaj jaroj mi skribis mian taglibron Esperante."

"Pli ol 80 jaraĝa, kaj ankoraŭ li aktive laboras kiel kuracisto", estas titolo de artikolo en *Duquesne Star, Duquesne, Pa.* Ĝi temas pri D-ro I. L. Kinney, kiu spite de surdmuteco, tre sukcese laboras kiel pied-kuracisto. Li ankaŭ propagandas Esperanton en la tag-jurnaloj. D-ro Kinney serĉas informon pri malnova korespondanto-surdmutulo, *Sinkind Schonberg*, antaŭe en Varsovio, Pollando. Ĉu iu povas helpi pri informo? Adreso: *Dr. I. L. Kinney, 38 First National Bank Bldg., Duquesne, Pa.*

Konferenco pri Mond-Registaro ĉe Kolegio Rollins presis "Alvokon al la Popoloj de la Mondo" en Esperanto. La "Alvoko" estis verkita de Carl van Doren, kaj tradukis ĝin Esperante Profesoro Edwin L. Clarke. Subskribis ĝin Albert Einstein, Raymond Gram Swing, kaj multaj aliaj eminentuloj. Oni povas ricevi senpagan ekzempleron de la "Alvoko" ĉe la adreso: *Kolegio Rollins, Winter Park, Florida.*

"*Peton pri Helpo por Greka Samideanino*" sendis al ni *Wm. A. Knox, Circle Pines Center, Cloverdale, Mich.* Tiu helpo estas aprobita de *Helena Esperantisto*. S-ro Knox deziras kolekti mon-helpon por *F-ino Despina Paka*, kiu bezonas operacion. Bonvole alskribu rekte al S-ro Knox pri tiu tre inda afero.

"*Manĝoj por la Milionoj*" estas la nova organizo en Usono, kiu vendas, dissendas kaj donacas speciale faritan farunaĵon, nomita *Multi-celada Nutraĵo*. Eta koverto entenas la manĝaĵon, kiu estas tre riĉa je multaj valoraj nutro-elementoj. Ĝi kostas nur 3-cendojn por tuttaga nutro-bezono! Petu pluan informon de Samideano Stephens. Adreso: *Donald Stephens, 119 East 19 St., New York 3, N. Y.*

Thomas A. Goldman, samideano antaŭe de Washington, D. C., nun troviĝas en Rotterdam, Nederlando, kie li deĵoras kiel Vic-Konsulo por Usono. Ni salutas kaj gratulas.

Universala Kongreso de Esperanto, en Bern, Svislando, 1947. Sendu al A.E. por senpaga prospekto.

Nova Esperanto-Klubo en Portland, Oregon, ĵus estas organizita. La membroj plejparte estas kursanoj de la klaso de S-ro J. M. Clifford. La sekretariino, S-ino Bonnie Teague, estas filino de nia malnova kaj fervora samideanino Olive H. Campbell. Ĉiu membro de la klubo estas ankaŭ membro de EANA — tre imitinda ekzemplo!

Ĉu vi ŝatus ricevi belan Esperantan Libron? Via tasko: Skribu al *Radio stacio OSTRAVA, Ĉekoslovakio*, pri, 1.) Kion vi opinias pri Ĉekoslovakio?, 2.) Kio vin interesas el nova vivo en Ĉekoslovaka Respubliko? Tiu, kies letero estos publikigata ricevos ekzempleron de gazeto kaj Esperantan libron.

Memor-Vespero je Lidja Zamenhof, okazis en Decembro en Nov-Jorko sub la aŭspicio de la Bahaa Centro. D-ro Stephen Zamenhof, kuzo de Lidja, partoprenis en la programo; Roan Orloff parolis pri la Vivo de Lidja; kaj S-ino Cora Fellows deklamis la poemon "Sub la Verda Standardo". S-ino Della Quinlan estris la programon.

DEZIRAS KORESPONDI

Kosto de Anonceto: Eksterlande, 2 resp. kuponoj; Enlande, 5 cendoj por unu vorto

Anglujo. League of Pals, 68 Windsor Crescent, Bridlington, Yorks. Junuloj kaj aliaj dezirantaj helpi mond-amikecon per korespondado pri flank-okupoj kaj ordinaraj temoj, Angle aŭ Esperante, sendu nomon kaj adreson por disdono al "Plum-Amiko". Avizu aliajn kaj starigu "Palisade"-Klubon.

Argentino. Luis Vicino, Castro Barros 1015-29, Sucursal 23, Buenos Aires. Ofertas interŝ. de neuzitaj P.M. de Argentino kontraŭ tiuj de via lando, laŭ oficiala mon-ŝanĝo.

Brazilo. F-ino Norma Guerrini, Rua Barao de Campinas 751, Sao Paulo. Dez. interŝ. il P.K. kun samideano en Usono.

Bulgarujo. Andrejo Iv. Jeĵev, str. "Knjazkiril" 26, Assenovgrad. Grupo dez. kor. kun Amerikanoj pri diversaj temoj.

Ĉekoslovakio. F-ino Marie Švarcova, Vrbno ve Slezsku, lekarna, 19-j. dez. interŝ. il. PK kaj fotografaĵoj kun junaj Esperantistoj.

Ĉinujo. S-ro Eltunko, P.O. Box 115, Chengtu, 33-j. ĵurnalisto dez. kor. kaj interŝ. pri gazetservoj, literaturo, muzikaĵoj. Ĉina Esperanta Biblioteko, ĉe Eltunko, danke akceptas Esperantajn eldonaĵojn.

Ĉinujo. S-ro Joanff Ĉou, c/o Chien Hwa Industrial Corporation, 104 Chung Cheng Rd., 10th Area, Tientsin. Dez. kor. pri internaciaj aferoj kaj geografio kun tutmondo.

Ĉinujo. S-ro Chin Kaigi, P.O. Box 175, Chungking, 24-j. fraŭlo dez. kor. kaj interŝ. P.M. kaj fotojn tutmonde.

Danujo. B. Andersen, Teglvark-salle 11, Aalborg. Instruisto kaj 30 geknaboj dez. interŝ. PM kun Usonaj geknaboj.

Francujo. F-ino Yvette LaFosse, 1 rue de la Marine, Auxerre (Yonne). 19-j. dez. kor. kun Usona junulo pri diversaj temoj, speciale pri Usono.

Francujo. Office de Transaction: Philateliques, 4 rue Jean-Claude-Tissot Saint Etienne (Loire). Por interŝ objektojn kaj korespondi aliĝu al la trilingva klubo "Amikeco". Petu informon.

Francujo. S-ro Jozefo Roche, cite Rocher Dn, e2, Cenon sur Vienne. Dez. kor. tutmonde.

Germanujo. S-ro Hans Fick, Neu Wokern 3, Post. Gr. Wokern, Mecklenburg, (Rusa Parto). Grupo de plenaĝuloj, geinstruistoj sopiras al leroj de Usono.

Nederlando. Johano Groenescheij Tulpstraat 33, Koog aan de Zaan. 43-sek. de Espo-Grupo dez. kor.

Usono. S-ro Bruno Beckman, Instruisto, Senior High School, Rochester Minn. Dez. kor. kun ĉiuj landoj post siaj 40 gelnantoj (15-18 jaraĵ.) per il. pk, interŝ. PM. Certe respondos.

Usono. S-ro F.L. Broening, 107 E Montgomery St., Baltimore 30, Md Kie troviĝas en Usono la fraŭlina samideanoj? 34-j. NEULO dez. kor. kun tiuj, prefere pri temoj bonhumoraj

Usono. S-ino Vera Loomis, 100th 9th Ave., S., Fargo, N. Dak. Dez. kor. tutmonde. Interesiĝas pri filozofio libroj, popoloj, kutimoj.

Usono. S-ro Louis Obreczian, Box 51, Waterman, Pa. 47-j. karb-minist dez. kor. Uzas patriotajn kovertojn kaj l-a tagajn.

Usono. S-ro Iver Svarstad, P.O. Box 1909, Long Beach, Calif. Kolektas il. PK kaj dez. interŝ. PK kun la tuta mondo.

Japanujo. F-ino Michiyo Marusawa Inadera Sonoda Kawabe, Hyogo. Membroj de Virina Asocio Laborista dez. kor. Speciale interesiĝas pri Usonaj virinoj laboristaj.

Japanujo. S-ro Kaĝuma Harada, ĉe Kuŝiro Koun Kaiŝa, 5-8 Miŝikamaĉi Kuŝiro (Hokkaido). 20-j. studento dez. kor. kun tutmondo.

ESPERANTO BOOKS

ESPERANTO HOME STUDENT, James Robbie. Beginner's text for class or self-instruction. 64 pp., newly printed 14th edition.....	.25c
PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO, Dr. Ivy Kellerman-Reed. More complete beginner's text. 142 pp. (war-time edition), formerly .75c, now only	.50c
STEP BY STEP IN ESPERANTO, M. C. Buder. Excellent simple text with instruction and numerous exercises. 244 pp. Paper, .85c; Cloth,	\$1.25
PRACTICAL ESPERANTO, Dr. Wm. S. Benson. Unique picture-method with 650 illustrations, English text, and Vocabulary. 80 pp.25c
UNIVERSALA ESPERANTO-METODO, Dr. Wm. S. Benson. "The only book of its kind in the world". 11,000 pictures. Pronunciation of Esperanto alphabet and tables of correlatives in 36 languages. Direct picture-method of instruction and definition. Complete textbook, reader, dictionary (fully illustrated with common words given in 40 languages), and index. A unique and encyclopedic book. 560 pp. cloth bound, stamped in gold	\$4.00
ESPERANTO, G. Alan Connor & Doris T. Connor. (World Language Series, edited by Prof. Mario A. Pei). A practical introduction to Esperanto, and systematic phrase-book. 32 pp.65c
LANGUAGES FOR WAR AND PEACE, Mario A. Pei, Ph.D. Guide to languages of entire world, incl. <i>Esperanto</i> (see above). 663 pp. cloth	\$5.00
ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY, by Major-General Cox. A complete analysis of Esperanto grammar, with helpful lists and examples. ..Cloth	\$2.00
ESPERANTO KEY (English). Esperanto in miniature. .. .10c; 3 for .20c; 10 for .50c	
10-in-1 DICTIONARY OF BASIC LANGUAGE, French, German, Spanish, Italian, Russian, Chinese, Japanese, Arabic, Portuguese, Esperanto, 10 languages, including Esperanto, in a nutshell. 110 pp. Paper .50c; Cloth	\$1.50
EDINBURGH DICTIONARY, Eng-Esp and Esp-Eng, 288 pp, best concise dict. .	\$1.00
AMERICAN POCKET DICTIONARY, Carl Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's pocket companion. 80 pp. (war-time edition)30c
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. 1942 edition. 490 pp. Cloth	\$3.50
ESPERANTISMO, I. Gomes Braga. Miscellaneous articles about Esperanto movement, in easy excellent Esperanto. Recommended for individual, class, or club reading practice. 32 pp.15c, 10 for \$1.00
ESPERANTO-SORTIMENTO: <i>Princo Vanc'</i> , Putnam-Bates; <i>Blanche</i> , Payson; <i>Miserere kaj Tbais</i> , Payson; <i>La Rozujo Ĉiumiljara</i> , Payson; <i>La Akrobato de Nia Sinjorino</i> . Payson, <i>La Mopso de la Onklo</i> . Good Esperanto reading at bargain prices to reduce stocks.....	.25c each; all 6 for \$1.00
SEP VANGOFRAPOJ, Karlo Aszlanyi. Most recent novel of the "Epoko Series". Translated from the Hungarian. 145 pp.75c
"LIFE OF ZAMENHOF" (English) \$1.25. "VIVO DE ZAMENHOF" (Esperanto)	\$1.25
LA FINO, by Count Bernadotte, world best-seller, popular edition, paper	\$1.00
JUNECO KAJ AMO (<i>Legendo el Venecio</i>), Edw. S. Payson. Cloth	.50c
THE LANGUAGE PROBLEM, Its History and Solution, E. D. Durrant. Highly recommended, complete treatise, with index. 168 pp. Cloth	\$1.50
"LA ESPERO" & "LA VOJO." Two separate Esperanto songs, with words and music for piano25c
INDIAN BEAD STARS. White background with green star in center.....	.75c

YOUR MEMBERSHIP IN E. A. N. A. WILL BE APPRECIATED

Membership, with "American Esperantist," \$2.00 per year. Sustaining Member, annually, \$5.00. Patron Member, annually, \$10.00. Life Member, one payment, \$100.00. All memberships include "American Esperantist." Your membership in one of the higher brackets will greatly aid in the promotion of Esperanto in North America. Send your membership dues to:

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA
114 W. 16 St., New York 11, N. Y

DR. ZAMENHOF SAID:

"Only a neutral language which belongs to none of the living nations, can be a suitable international language. It is self-evident that the people whose language were chosen as international would soon acquire a great predominance over all other peoples."

"We constantly repeat that we do not at all wish to interfere in the internal life of peoples, but only to create a connecting bridge between them. We wish to create a neutral foundation on which the various peoples can communicate with one another in peace and brotherhood without forcing the ethnic characteristics of one people upon others."

"Among Esperantists there are no stronger or weaker, privileged or unprivileged nations; no one is humiliated, no one is ashamed. All of us, with full equality and on a basis of neutrality, feel ourselves to be members of one nation ('one world') and members of one human family."

"A whole hundred sensational inventions will not cause such a great and beneficent revolution in the life of mankind as the introduction of the neutral international language. Thanks to Esperanto it is possible for all peoples to understand one another, and the world will sooner or later become one great human family consisting of different ethnic groups, internally with different languages, but externally with the same interlanguage."

—Quoted from "Pensoj de Zamenhof", published by the Swiss Esperanto Society, 1945. The booklet may be secured from the American Esperantist at 35c per copy.